Unua benzin-aŭtomobilo de Marcus.

Siegfried Marcus, la konstruinto de la unua aŭtomobilo. Li estis naskita en Mecklenburg kaj venis 1860 al Vieno, fondinte en la malnov-Viena domo Mariahilferstraße 107 elektro-mekanikan laborejon. Lia famo kiel teknikisto estis tiel granda, ke imperiestro Franz Josef I. vokigis lin, por instali en la dormoĉambro de imperiestrino Elisabeth elektran sonorilon, kaj tiu „teknika faro" estis tiel kontentiga, ke Franz Josef nomigis la inĝenieron instruisto de kronprinco Rudolf, por instruadi lin en la „praktika fiziko". Marcus sukcesis, konstrui gas- kaj petrolmotorojn, kiuj estis patentitaj en ĉiuj landoj. Li muntis la maŝinon en veturilon kaj 1864 li povis okazigi la unuan veturprovon sur „Schmelz" (en Wien) kun la konata aŭstria sportisto Albert Curjel. 200 metrojn veturis la unua aŭtomobilo, poste malfunkciis la motoro kaj la prov-veturo estis finita. — La unua Marcus'a aŭtomobilo, kiu jam fakte kontentige funkciis, estis konstruita 1875, unuigis ĉiujn karakterizaĵojn de la moderna aŭtomobilo kaj estas nun starigita kiel monumento de aŭstria inventista genio en Viena Teknika Muzeo.

(Daŭrigota.)



Salzburg, prezentado de „Faust".

64. * Maier d-ro Hugo, Wien.
65. Hesse Franz, studento, Wien.
66. Tischler-Pfister Margarete, Wien.
67. Hof Hermine, poŝtinsp.-ino, Wien.
68. Lidl Rudolf von, ŝtate ekz. E.-instr., Salzburg.
69. Frey Rudolf Michael, kalk. kons. e. p., Wien.
70. * Stengel Fritz, registara kons., Wien.
71. Feichtinger Frieda, fakinstr.-ino, Wien.
72. * Rentmeister Werner, privatofic., Wien.
73. Gasperini Carl von, ofica kons., Wien.
74. Moser Ernst, komerc., Wels.
75. Pfeiffer Eduard, pentristo, Innsbruck.
76. * Scherpon Sidi, baronino, Wien.
77. Fink Alois, ŝtatofic., Tamsweg, Aŭstrio.
78. Waldhör Franz, laborestro, Wasenbruck, Aŭ.
79. Dittrich Edmund, burĝlern. dir., Wien.
80. * Frey Max Rudolf, univ. stud., Wien.
81. * Fiedler Maria f-ino, priv. instr., Wien.
82. Langer Anton, ekonomo, Unter-Retzbach, Aŭ.
83. Christanell d-ro Franz, pastro, prof., Salzburg.
84. Boda Nikolaus, juĝeja sekr., Oberpullendorf.
85. Navratil Adolfine f-ino, Wien.
86. Schilhavy Maria f-ino, Wien.
87. Kolarik Adolfine, Wien.
88. Heißl Max, elektrofakulo, Ebensee, Aŭstrio.
89. Wüster d-ro inĝ. Eugen, Wieselburg, Aŭstrio.
90. Schwarz Alexander, ofic., Wieselburg.
91. Schwarz Adele, Wieselburg.
92. Pokorny Karl, lerneja konsil e. p., Wien.
93. (LKK) Werner Ernst, fakofic., Wien.
94. * Frey Elisabeth f-ino, Wien.
95. Wimmer Florian, studento, Linz.
96. Ziwutschka Louise f-ino, fakinstr., Wien.
97. Brückl Franz, ĉefinstr., Streifing, Aŭstrio.
98. Müller Otto, urba ofic., Klagenfurt.
99. Braun Franz, ĉefadministr. e. p., Rodaun, Aŭ.
100. * Kail Herbert, univ. stud., Wien.
101. Schiebl Hans, poŝtdir. e. p., Wien.
102. Hinterholzer Anna f-ino, instr., Klöch, Aŭ.
103. Mair Albert, fakinstr. e. p., Innsbruck.
104. Pötzl Maria, Langenzersdorf, Aŭstrio.
105. Diller Hilde f-ino, bankofic., Linz, Aŭ.
106. Jungschaffer Hans, fakinstr., Ried i. I., Aŭ.
107. Franz Karl, ĉefofic., Wels, Aŭstrio.
108. Jurek Gustl, priv. ofic., Wien.
109. Schamanek Josef, lern. dir. e. p., Unter-Tullnerbach, Aŭstrio.
110. Schierka August, vicinsp., Wien.
111. Halbedl d-ro Adolf, advok., Ried i. I., Aŭ.
112. Holey Franz, ĉefofic e. p., Wien.
113. Jacobsen Carla, telef. ĉefofic-ino, Wien.
114. (LKK) Engländer d-ro Alfred, advok., Wien.
115. Engländer Irene, komercakad. prof., Wien.
116. Berger Amalie f-ino, lingvolern. posedantino, Wien.
117. Sprinzel Hermine f-ino, ofic-ino, Wien.
118. Jünger Rosa f-ino, kontor-ino, Wien.
119. Huber Anna, Wien.
120. Fötinger Franz, instr., Salzburg.
121. Fötinger Wilhelmine, Salzburg.
122. Engler Rudolf, ofic., Klagenfurt, Aŭstrio.
123. Kreutzer Michael, maŝin., Edelschrott, Aŭ.
124. Hirsch d-ro Alf., komerc., Hořice v Podkronoši, ČSR.
125. Schmid Leonhard, ĉeflern. instr., Klagenfurt.
126. Schmid Josefine, Klagenfurt.
127. Resch Franz, poŝtofic., Wien.
128. Mirwald Anton, ŝuisto, Linz, Aŭstrio.
129. Legerer Heinr., bakisto, Leoben, Aŭstrio.
130. Dürrschmid Karl, vendejestro, Klagenfurt.
131. (LKK) Pfeffer d-ro Emil, Wien.
132. (LKK) Hovorka Nikolaus barono, Wien.
133. * Chiba Leopold, ofic. e. p., Wien.
134. Linsbauer Franz, Wien.
135. Nummelin Wanda Eugenie, naci-ekonomiistino, Tallinn, Estonlando.
136. Chapron René, advokato, Le Mans, Francl.
137. Chapron (edzino), Le Mans.
138. Zamenhof d-ro Zofja, Warszawa.
139. Kleiner Josef, komerc., Ruse, Bulgarl.
140. Hermann Marie, Wien.
141. Peterson Gabriele, instr.-ino, Tallinn.
142. Rußmayr Lya, ofic-ino, Straßwalchen, Aŭ.
143. Demetler Leopold, ofic., Wien.
144. Buchty Emilie, instr.-ino, Aachen, Germanl.
145. Oliver A. C., London.
146. Went Dorothy Mary, instr.-ino, Romford, Britl.
147. Robertson Robert, pens., London.
148. Holmes H. W., London.
149. Holmes N.s-ino, London.
150. Szyk Salomon, ĵurn., Wilno, Pollando.
151. Baldwin Smith Ella, lernejestrino, Barry, Britlando.
152. Bloemendal S. W. f-ino, Lochem, Nederl.
153. Tetterode J. J. M., f-ino, Lochem.
154. Griendl Anna, Wien.
155. Siedl Ludwig, kalk. kons. e. p., Wien.
156. Siedl Christine, Wien.
157. Siedl Heribert, studento, Wien.
158. Wieninger Olly f-ino, Wien.
159. Chudoba Karel, ofic., Bratislava, ČSR.
160. Neužil Albin, lernejestro, Olomouc, ČSR.
161. Havas Julio, insp., Komárno, ČSR.
162. (UEA) Scholze inĝ. Gustav, prof., prez. de Germana E.-Ligo en ČSR, Reichenberg.
163. Saget Georges, ĥemiisto, Elbeuf s/Seine.
164. Bergmann Berta, instr.-ino, Reichenberg.
165. Huber Hans, ĉefinstr., Merkersdorf, Aŭ.
166. Mudrak Walter, bankofic., Wien.
167. Kyftenbelt R. W. F., pastro, Utrecht, Nederl.
168. Kühlmann A., f-ino, Lochem, Nederl.
169. Dercks J. F. C. M., komerc., Bergen op Zoom.
170. Guglielminetti Laura, Torino, Itallando.
171. Guglielminetti Clelia, f-ino, Torino.
172. * Bauer Hans, fakinstr., Stegersbach, Aŭ.
173. * Bauer Anna, Stegersbach.
174. Winkelhofer Valerie, ofic-ino, Wien.
175. Ondryas Anny, ofic-ino, Wien.
176. Heeber d-ro Wilh., kortega kons., Wien.
177. Krauß Marie, Wien.
178. Buchanan George Douglas, komerc., Glasgov.
179. Schöpfer Franz, lerneja kons., Voitsberg.
180. ** Austreks (Aŭstria Esp.-Komerca-Soc.), Schruns, Aŭstrio.
181. Justesen d-ro P. Th., Kaamane, Finnlando.
182. Kaper Reinhold, inĝ., Tallinn.
183. Kapper Martha, s-ino, Tallinn.
184. Painer Daisy, ofic-ino, Tallinn.
185. Taft Alvene, ofic-ino, Tallinn.
186. Harabagiu H., ofic., Bucuresti, Rumanlando.
187. Harabagiu Giselle, f-ino, Bucuresti.
188. Dietl d-ro Wilh. E., stabĉefkurac., Baden
189. ** Suchard Ph., ĉokol. fabriko, Bludenz, Aŭstrio.
190. Rollet de L'ISLE Maurice, prez. de Esperantista Lingva Komitato kaj Esp.-Akademio, Paris.
191. Goloversnik Josefa, Wien.
192. Schönrich Kurt, Wiesbaden, Germanlando.
193. Rousseau Célestin, apotek., Courbevoie-Bécon.
194. Sinner Oskar, majoro e. p., Wien.
195. Govers Cornelius, modelisto, Den Helder, Nederl.
196. Tuinder Hendr. Joh., elektristo, Serbalawan, Nederlanda Orienta Hindujo, Azio.
197. Grupo Esperantista „Verda Stelo", „Unua Kongreso", Boulogne s. M., Franclando.
198. Flasch d-ino Brunhilde, prof., Wien.
199. ** Ĉehoslovaca Akcia Societo, fabriko por pretaj vestaĵoj, Bucuresti.
200. Pentermann G. S., f-ino, Rotterdam, Nederl.
201. Warren George, poŝtisto, London.
202. Davies Milliam, Morriston, Britlando.
203. Holness Anie Beatrice, ofic-ino, New-Barnet.
204. Such M., f-ino, Huby, N. Leeds, Britlando.
205. Wilkinson D. F., f-ino, Huby, N. Leeds.
206. Squire Emmeline f-ino, lernejestrino, West Hartlpool, Britlando.
207. ** Matasa Zwicky, Akcia Soc., Bucuresti.
208. ** Fratii Mohnblatt, fabriko, Bucuresti.
209. ** Gromen & Co., teksaĵ-industrio, Cisnădie-Heltau, Rumanlando.
210. Avril Georges, ĵurnalisto, Nice, Francl.
211. Frankamp A. Elisabeth, f-ino, Nijmegen, Ned.
212. Malmanche d-ro Leopold Adrien, farmac., Rueil-Malmaison, Franclando.
213. Jacob Marie Josephine, prof-ino e. p., Thonon les Bains, Franclando.
214. Schlamowitz Isak, ofic., Odense, Danlando.
215. ** Frederic Spodheim & Co., Akcia Societo, Bucuresti.
216. ** Exportul Românesc, Akcia Societo, Bucuresti.
217. ** Gutermann & Co., Akcia Soc., Bucuresti.
218. Rollandet M., f-ino, Leiden, Nederlando.
219. Binder Christian, ofic., Obertraun, Aŭ.
220. Ravestein Jozef, instr., s'Gravenhage.
221. Ravestein J. M. s-ino, s'Gravenhage.
222. Csenár Božidár, komerc., Unterpullendorf.
223. Wachmann-Stroh F. L., lernejestrino e. p., Leist, Nederlando.
224. Clavenna Attilio, Genova-Sampierdarena.
225. Torres-Carreras d-ro R, rentgenologo, Barcelona, Katalunujo.
226. Wiesinger Marie, poŝtofic-ino, Wien.
227. Pabisch Marie, poŝtofic-ino, Wien.
228. Grüner Rudolf, frizisto, Wels, Aŭstrio.
229. Seidl Matthias, krimin. ofic. e. p., St. Andrä-Wödern, Aŭstrio.
230. Summer Martin, pastro, Buchboden, Aŭ.
231. Schmirer Leopoldine, f-ino, Vöcklabruck.
232. Fohler Brünne, f-ino, Vöcklabruck, Aŭ.
233. Fischthaller Josef, Wels, Aŭstrio.
234. Pilz Josef, soldato, Wels.
235. Gaigg Johann, soldato, Wels.
236. Landström Evi, f-ino, Tallinn.
237. Ameelina Helene, Tallinn.
238. Viidas Garda-Erika, instr-ino, Nõmme, Est.
239. Viidas Herta, instr-ino, Nõmme, Est.
240. Kaes Hedwig, ofic-ino, Wien.

241. Migliorini d-ro Elio, jurnal., Roma.
242. Leftwich A. W., Alford, Britlando.
243. (Bl) Keily P. T., jurnal., Alford.
244. Studer Maria Theresia, stud. jur., Olten, Svislando.
245. Lochner Maria, instr-ino, Eggenburg, Aŭ.
246. Arnold Emma, instr-ino, Belfast, Irlando.
247. McCullogh Sarah, instr-ino, Belfast.
248. Drake W. J., London.
249. Drake L. C., s-ino, London.
250. Edwards Amy Barton, instr-ino, Bishop Auckland, Anglujo.
251. Vay Margaret, instr-ino, Bishop Auckland.
252. Howard Helen, f-ino, London.
253. Kennedy David, Glasgow, Skotl.
254. Mason Lewis, Glenfield, Britl.
255. Warren Harriet s-ino, London.
256. Drössler Otto, fakinstr., Wien.
257. Telling Jakob, aranĝanto de karavano, Rotterdam.
258. Hoŝtalek d-ro Hans, inĝ., Č. Budejovice.
259. Hoŝtalek Anna, s-ino, Č. Budejovice.
260. (Bl) Racek Therese, Würnitz, Aŭstrio.
261. Jirka Karl, Č. Budejovice.
262. Troump Marcel, Aix-en-Provence.
263. Roux Georges, Orléans.
264. Fabjan Erna, instr.-ino, Bregenz.
265. Safránek Josef, Č. Budejovice.

Laŭlanda resumo: Alĝerio 1, Anglujo 27, Aŭstrio 118, Bulgarujo 4, Belglando 2, Ĉeĥoslovakio 16, Danlando 1, Estonujo 11, Finnlando 1, Franclando 19, Germanlando 7, Hungarlando 5, Irlando 2, Italland 7, Katalunujo 1, Nederlando 19, Nederl. Hindujo 1, Pollando 7, Rumanlando 9, Skotlando 3, Svedlando 1, Svislando 2, Usono 1. Entute 265 aliĝintoj el 23 landoj!

Al la ekskursoj A kaj B aliĝis ĝis nun 39 personoj.

Grandstilan **propagandon** faradas Brita E.-A. kaj Franca Soc. p. Prop. de E. — Dankon.

Festludoj en **Salzburg**, detaloj en la F e b r u a r a numero.

Donacoj al la kongreskaso:

John Buchanan, Glasgow	ŝ	41.—
Collet de l'Isle, Paris	ŝ	35.—
Dr. Spielmann, Bern	ŝ	8.60
Dr. Malmanche, Rueil-Malmaison . .	ŝ	8.60
Pentermann, Rotterdam	ŝ	14.90
Fino Jacob, Thonon les Bains . . .	ŝ	51.—
sumo . . . . aŭ.	ŝ	159.10

Donacoj al la blindulkaso:

Generalo Rambousek, Č. Budejovice	ŝ	9.95
Fino Staes, Bruxelles	ŝ	8.56
Malmanche, Rueil-Malmaison . . .	ŝ	8.60
sumo . . . . aŭ.	ŝ	27.11

Vintrosporto en Salzburg.

Por la kongresanoj kaj lernantoj por ekzerco:

Ĉe la limo (Dogano).

Kontrolo de dogandeva havaĵo kaj de la pasportoj en la trajno.

Vi nur rajtas eliri la vagonon post la kontrolo.

Bonvolu montri vian pasporton!

Ĉu vi havas dogandevajn aĵojn, novajn vestojn, cigarojn k. t. p.?

Kiom da cigaroj, cigaredoj kaj tabako oni povas kunhavi sen pagi imposton?

50 cigaredoj aŭ 10 cigaroj aŭ 50 gramoj da tabako estas doganliberaj.

Bonvolu malfermi vian kofron!

Miaj vestoj ne estas novaj kaj nur por mia persona uzado.

Dankon, vi rajtas jam fermi la kofron.

Montru vian pasporton!

Mankas la aŭstria enir-vizo.

Mia kongreskarto rajtigas min al senviza envojaĝo al Aŭstrio.

Pardonu, vi pravas. Bonan vojaĝon!

Dankon, ĝis revido!

An der Grenze (Zollamt).

Zoll- und Paßkontrolle im Zuge.

Sie dürfen den Wagen erst nach der Kontrolle verlassen.

Bitte, Ihren Paß vorweisen!

Haben Sie zollpflichtige Sachen, neue Kleider, Zigarren usw.?

Wie viele Zigarren, Zigaretten und Tabak kann man mitführen, ohne Zoll zu zahlen?

50 Zigaretten oder 10 Zigarren oder 50 Gramm Tabak sind zollfrei.

Wollen Sie Ihren Koffer öffnen!

Meine Kleider sind nicht neu und nur für meinen persönlichen Gebrauch.

Danke, Sie können den Koffer schon schließen.

Zeigen Sie Ihren Paß!

Es fehlt das österreichische Einreisevisum.

Meine Kongreßkarte berechtigt mich zur visumfreien Einreise nach Oesterreich.

Entschuldigen, Sie haben recht, gute Reise!

Danke, auf Wiedersehen!

Poŝtkartoj kun E.-teksto.

aperos laŭ informo de la Aŭstria Generalpoŝtdirekcio ankoraŭ en januaro. Estos eldonata serio de 50 diversoj vidaĵkartoj kun klariga teksto en germana, franca, angla kaj Esperantolingvoj. Ni raportos ankoraŭ!

Jarlibro de la Esp-Movado 1935.

(23-a jaro), suplemento al la eldono 1934. — Meze de dec. ĝi aperis kaj estas mirinde, ke la direktoro kun sia malgranda personaro povis krom la ampleksega laboro ankoraŭ finverki la 80-paĝan libreton, belaspektan. Jen ekstrakto el la antaŭparolo:: ...La veraj uzantoj ĝin urĝe bezonas pro la ŝanĝoj, okazintaj depost la lasta eldono, liverita ankaŭ en 1935. Estas konate, en kiaj malfavoraj kondiĉoj la nunaj gvidantoj de UEA. en Stockholmo prenis sur sin la direktadon de la asocio. La financa situacio estis malbonega, ja rekte danĝera por la plua ekzistado de la organizo. Malfavora impreso kaŭzis fido-krizon kaj per tio pli fortigis la malhelpaĵojn, jam sufiĉe grandajn pro la ĝenerala krizo en la tuta mondo. UEA. tiamaniere travivis tre malfacilan jaron, eble la plej malfacilan depost sia ekzisto. Sed pruviĝis la solidareco de l'samideanaro per sufiĉa kotizado, faktoro kuraĝiga por la estonteco de UEA. Dank al nia singardema mastrumado ni povis fermi la jaran kalkulon de 1935 sendeficite, fakto ĝis nun unika en la financa historio de la asocio.

La malfavora ĝenerala situacio devigis nin al aperigo de malpli ampleksa jarlibro,, nur suplemento al la eldono de 1934... La apero de kompleta jarlibro estas antaŭvidita por marto 1936. La realigebleco nur dependas de la financa forto, kiun havigos al ni la esperantistoj.

En 1915, 1917—19 UEA. tute devis rezigni pri jarlibro, 1920 elvenis nur maldika broŝuro. ...Ke ni sukcesis bonorde elvenigi modestan, fidindan jarlibron por tiu Periodo, por kiu la antaŭaj direktantoj de UEA. jam antaŭvidis la pereon de UEA., atestas nur la vivkapablecon de nia asocio. Tio samtempe pruvas, ke la vojo surirata nun estas la ĝusta.. Ĉiam pli forta asocio pligrandigos niajn kapablojn kaj permesos, per sistema, serioza agado, realigi projektojn kaj planojn, kiuj ĝis nun tute ne estis realigeblaj... Robert Kreuz.

Germanlingva ŝlosilo.

Laŭ kontrakto kun U. E. A. mi persone transprenis la eldonadon de ĉi tiu ŝlosilo, kiun ĝis nun eldonis Ellersiek en Berlin. Ĝi aperos 36-paĝa meze de januaro **de mi tute novaranĝita** kaj kostos **10 g** plus **5 g** afranko. La libreto estas la plej bona, malmultekosta varbilo, sendota nur post sendo de la koncerna sumeto en poŝtmarkoj. Je mendo de 5 ekz. afranko je miaj kostoj, de 10 krome aldono de 1 ekz. senpage, de 50 (7 senp.), 100 (15 senp.). Steiner.

Universala Esperanto-Asocio
Ĉefdelegiteco por Aŭstrio
Wien, I., Neue Burg.

La nova administra jaro de UEA. komenciĝis; ĉiu esperantisto estu membro kaj en ĉiu loko estu delegito de UEA! Peto al niaj fidelaj delegitoj kaj membroj: Varbu fervore en la kongresjaro!

a) membro k. jarlibro: Nia kotizo: ŝ 5.—; por membroj de AEA.: 4.25. b) m-abonanto (krome gazeto „Esperanto"): Nia kotizo: 12.50; por membroj de AEA.: 11.30. c) m-subtenanto (krome bela libro): Nia kotizo: 40.—. Aldonu afable por kovri miajn elspezojn ĉe la poŝto, ĉar la kotizo estas neta, por a) 10 g, b) kaj c) 15 g. Koran dankon. Pago petata al poŝtŝparkasokonto B 178.935 (Gustav Weber, Wien). Informoj volonte donotaj marde kaj vendrede de 16h—17h30.

Aŭstria Esperanto-Asocio
Wien, I., Neue Burg (Tel. R-27-803).

Ni komencas novan agadjaron kaj sendas al ĉiuj niaj membroj ĉekon pro enpago de ŝ 2.— (familianoj kaj senlaboruloj po ŝ 1.—) plus 10 g por la poŝtelspezoj. Ni tuj sendos al vi kvitancon pri la pago por 1936 kaj kuponaron de UEA, kies simpla membro vi fariĝis.

Varbu, por ke ĉiuj viaj konatoj estu membroj de UEA, sed ankaŭ ne forgesu, ke Aŭstria Esperantisto, nia oficiala organo, estu ankaŭ via informilo!

Bad Vöslau. Cseh-metodaj kursoj, gvid. de prez. Jüptner de E.-grupo „Verda Stelo" por komencantoj kaj progresintoj bone funkcias.

...lt-Dietmanns: Kurso komenciĝis kun 15 pers. Gvid. Fred. Piźl.

Baden: La 19. de dec. okazis finsoleno de Csch-metoda kurso. Parolis la kursgvidanto s-ano Jüptner el Vöslau kaj disdonis atestojn de Int. Csch-Instituto. „La Vojo" estis parolata en E. de Paul de Pisecki, germane de f-ino Hammerer. Vicprez. Dick dankis al la kursgvidanto, sen'ace laborinta.

Gross Siegharts kaj cirkaŭajo. La s-anoj festis en la popolĉernejo de Dietmanns la trian datrevenon de enkonduko de E. en Dietmanns kun Zamenhof-festo. Ĉeestis 27 ges-anoj.

Himmelberg: Kurso, kun 12 pers., gvid. s-ano Koppitsch.

Kursoj en Tirol komenciĝos en januaro. Nia nederlanda s-ano **Buenting** kiel lastjare gvidos ilin.

Wels. S-ano Wagnleitner klopodas en la rondo de „OSS-Frontsoldatoj" kaj nun ekgvidas E.-kurson kun 20 personoj kaj krome kun 48 infanoj.

Wien. E.-Klubo ĉiun **mardon** de 18h30—22h en I., Wallnergasse 6 (en la domenirejo la unua pordo dekstre). Kurso por ekzerco kaj seminario por spertuloj. Gastoj bonvenaj! Elspezoj 15 g!

Wien. Kursoj en la policlernejo.

Zamenhof kaj Kristnaskfesto en Salzburg, la 14. dec., en „Schwarzes Rössl" estis bonege vizitita. Prof. dro Christanell prelegis „Mia penso" en E. kaj germana traduko; prez. prof. Scheierl parolis pri la kongresparoladoj de l'Majstro kaj eksprez. Stegmüller faris belan Kristnasko-paroladon. Malavare la ĉeestantoj donacis por „donactemplo".

Renkontiĝo en Wels.

La 8. de dec. 120 ges-anoj el Supra A. kunvenis en Wels por travivi en samideana medio belan tagon. Post salutvortoj de prez Franz faris kort. kons. Steiner la festparoladon, krome parolis s-roj Mraz (Linz), von Lidl kaj prof. dro Christanell (Salzburg). Sub la direktado de nia multflanka s-ano Moser muzikis orkestro, kantis kvarteto kaj kanthoro kaj li mem deklamis „La vojo"-n, s-ano Franz prelegis kaj rakontis spritaĵojn kaj poste dum kelkaj horoj oni dancis ĝis mi reveturis je la 3a matene al Vieno. Mi ege sentis min hejme en tia gaja societo. Steiner.

Zamenhofa Festo en Danubio-Wien okazis la 16. dec. Post enkondukaj vortoj de prez. Cech la festparolado estis farita de d-ro Pfeffer; sekvis laŭtlegado de Fr. Vasta pri „Homaranismo", de kortega kons. d-ro Heeber pri „Z. kiel edukisto" kaj de Max R. Frey pri „Kongresparolado en Krakovo 1912".

Unua festvespero por la aŭskultantoj de la Radio-Esperanto-Kurso.

La 14. de dec. okazis en la festsalonego de Malnova Urbdomo en Wien festarangxo je memoro al la aŭtoro de Esp. En la plenplena salonego kolektiĝis parto de la aŭskultantoj de la Esperanto-Radio-Kurso (proks. 350 pers.).

Post salutvortoj de kortega kons. Steiner, gvidanto de la E.-movado en Aŭstrio kaj de l'Radio-E.-Kurso, kaj post mallongaj festparoladoj en germana lingvo kaj en E. (E. Werner, dro Pfeffer) oni prezentis programon de speciale artisma karaktero.

Inde al la solena signifo de l' arangxo oni aŭdigis unue seriozajn prezentaĵojn; en germana lingvo kaj en Esp. kantis Richard Weiss „La ambaŭ grenadistoj", Anton Schott „Al la muziko" kaj ambaŭ antaŭe menciitaj kun Otty Santera la terceton el „Fidelio". Antaŭ tio la 13-jara pianistino Liesl Stary eksterordinare majstre ludis Rigoletto-parafrazon Liszt-Verdi.

Post mallonga paŭzo la knabina E.-ĥoro de komerc-lernejo Schremmer malfermis la gajan parton per „La Truto" kaj „Matena serenado" de Schubert kaj „Lulilkanto" de Mozart, akompanata de d-ro Fritsch. Poste sekvis Otty Santera kun kantoj el „Giuditta" kaj „Lando de l' ridado"; Liesl Stary ludis la parafrazon el „Vesperto" de Grünfeld, poste Santera-Schott aŭdigis en bonhumora maniero du popolkantojn el Napoli. Inde finiĝis ĉi tiu de Esp.-Klubo arangxita vespero per la Esp.-himno, kantita de Santera-Weiss-Schott. — Ĉiujn kantojn akompanis kun granda ensentiĝo Maria Fiedler. La interligajn vortojn gajhumore parolis Martin Lang. La E.-tradukoj estas de regist. kons. Stengel.

La vespero pasis eksterordinare agordoplene; la aŭskultantaro montris sian dankon per senfina aplaŭdado post ĉiu unuopa prezentaĵo kaj esprimis la deziron, ke E.-Klubo-Wien arangxu tiajn artismajn prezentadojn ĉiu-monate en sama vigla maniero, sed en ankoraŭ pli granda kadro.

Zamenhof-Festvespero en Wr. Neustadt

La 12. dec. la E.-fakgrupo de la urba kleriginstituto Wiener Neustadt arangxis en la deca kadro de la bela festsalonego de Instruista Seminario imponan feston, kiun ĉeestis 150 personoj. S-ano H. Weinhengst el Wien parolis pri la vivo de nia majstro. En la riĉa kaj arta programo krom grupmembroj kunaktoris 25 mandolinistoj, juna fama kantistino kaj virtuozo sur la piano.

La bona sukceso montras la konstantan fortiĝadon de la movado en nia urbo kaj la grupo, estrata de kelkaj fervoraj movaduloj, baldaŭ nombros 100 s-anojn. Samtempe nun estas gvidata kurso kun 30 pers.

Kursoj por poŝtistoj ekfunkcios en januaro en Graz, Innsbruck, Klagenfurt, Linz, Salzburg, Wien.

Radio Wien:

Kurso: 8., 22. I., je 18h30—18h55; 15., 29. I., 5. II., je 18h35—19h.

Eksterlanda servo: 14. I. d-ro inĝ. **E. Wüster** pri „En aeroplano super Aŭstrio" je 22h40 kaj **merkrede** je la fino de la instruhoro.

La **E.-gazetoj** estas petataj **represi** almenaŭ la ĉefajn punktojn, la **samideanoj publikigi** ilin en la nacia gazetaro kaj **sendi** koncernan numeron al **LKK.**

Junaj **policistoj** (kursanoj), kiuj deĵoros dum la kongreso, deziras jam nun konatiĝi kun kongresanoj, prefere fraŭlinoj. Skribu la unuan fojon al LKK. „Polica kurso".

Al viaj demandoj aldonu **respondafrankon!**

Al demandoj ĝenerale interesaj ni respondas en la gazeto kaj per **Radio,**

2. Festvespero por la kursanoj el Radio-Wien, marde, la 14. januaro, je la 19h 30 en la

Festsalonego de Malnova Urbdomo Wien, I., Wipplingerstraße 8

Gaja programo germane kaj en Esperanto. **Geaktoroj:** Radio-lernantoj: Maria Fiedler, Mathilde Gangl, Herta Golliasch, August Schlerka, Elsa Sgalitzer, Yvonne Stepan, Hugo Sterne.

La kursgvidanto en nova rolo kiel „Parolanto de la interligaj vortoj".

Kora invito al la lernantoj el Radio, en aliaj kursoj kaj al la samideanoj.

Esperanto-Klub: Steiner.

Großglockner Transalpa Ŝoseo,

la jus aperinta E-gvidlibro kun belega panoramo-karto multkolora kaj 15 bildoj 12 paĝa, eldonita de Großglockner-Hochalpenstraße A.-G., estas sendata al ĉiu kongresanoj kun ĉi tiu kongresnumero.

Rekomendataj:

Cigaroj kaj cigaredoj de

Oesterreichische Tabakregie

famaj kaj preferataj en la tuta mondo pro sia kvalito.

Nia oficiala kongresasekurejo „Der Anker", Wien, I., Hoher Markt 10—11, donas nur al la kongresanoj, venontaj el iu Eŭropa Lando escepte Rusujo, por asekuro de pakaĵoj kaj kontraŭ akcidentoj en la daŭro de 1 monato jenajn speciale favorajn kotizojn:
I. sfr. 2.35 a) por pakaĵasekuro je ŝ 500.—
b) por akcidento: ŝ 2500.— je morto kaj ŝ 5000.— je daŭra invalideco;
II. sfr. 4.55 a) je ŝ 1000.—, b) ŝ 5000.— kaj ŝ 10.000.—.
Mendo kaj pago kun la kongreskotizo al LKK.

La ĉapelo **„Esperanto"** el la fabriko **Carl Ceschka & Söhne,** Wien, VII., Kaiserstraße 123.

La tramvojo al **„Pöstlingberg"** en Linz.

La termejo **„Warmbad Villach".**

„Aŭstria Festo je honoro de Bruckner" Linz - St. Florian, 18.—21. VII. 1936.

Bad Ischl, la plej frekventata salbanloko en Aŭstrio.

Hotel de France, Wien, I., Schottenring 3. Tel. A-17-5-75. Unuaranga familia hotelo.

Per Esperanto al feliĉo!

Nia samideanino Olga Klotz konatiĝis dum la kongreso en Stockholm kun la svedo Hedberg. Ili korespondis kaj ĉijare s-ano Hedberg venis al Wien kaj fianĉiĝis kun la Vien-anino. La 7. dec. ili geedziĝis en Bredbyn. Koraj gratulojn!

Spritaĵoj.

„Moritz atentu! Se domo havas kvar etaĝojn kaj al ĉiu etaĝo kondukas ŝtuparo kun dudek kvin ŝtupoj, kiom da ŝtupoj mi devas supreniri por atingi la kvaran etaĝon?"

„Ĉiujn, sinjoro instruisto!"

„Kial vi ĉiam surhavas nur unu gantonon? Ĉu vi perdis la alian?"

„Tute ne, sed mi nur trovis unu."

Grafologia angulo
red. Josef Hofmann

Kontraŭ alsendo de 24 g-poŝtmarko, eksterlando 1 int. resp. kupono, ni publikigos ĉiam en la venonta numero sub la de vi elektita signovorto, kion nia grafologo legis el via manskribo.

Ensendu tekston 20 linian, skribitan mane kaj per inko sur neliniita papero, aldonante aĝon, sekson, profesion kaj nacion.

Eigentümer, Herausgeber und verantwortlicher Redakteur: Hofrat Hugo Steiner, Binderberg, Bundesstraße 154. Druck: Buch-, Kunst- und Zeitungsdruckerei „Albrecht Dürer", Wien, VII., Bandgasse 28.